

KOMENCANTO

revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Dalmatova Daŝa
[Jelec, Rusio]

2003

Kiel Stano Marček, redaktoro de "Esperanto", iĝis esperantisto
literatur-historiaj paĝoj — Vladimir Opletajev - originala rakonto
primavero, amo, espero — gramatiko serioze kaj ŝerce — tempo kaj
homoj — neelpensitaj historioj — aforismoj — anekdotoj — diversaj
ondoj de bunta mondo — korespondu!

2

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, IP10 0LA

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvorĥka 1, CZ-696 62 Strůznice

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsengade 10, DK-4800, Nykobing F.

Estonio Virve Ermits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuressaare.

Finnlando Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio ~ Unuigo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio Višnja Brankoviĉ,

Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

Irlando Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

Nov-Zelando David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Portugalio Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum pl 455, SE — 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

Redakcie

Degelis neĝoj en la norda hemisfero kaj venis printempo, kiu ĉiam ekscitas admiron, elvokas neordinarajn sentojn kaj pensojn, inspiras krei.

Al Primavera kaj sentoj, kiujn ĝi vekas, estas dediĉitaj multaj paĝoj de tiu ĉi kajero. El la rubriko "Kiel tio komenciĝis" vi ekscios, ke redaktoro de nia ĉefa revuo "Esperanto" ligas sian esperantistiĝon kun la unua amo. Sur la literatur-historiaj paĝoj daŭras prezento de la aŭtoroj de skota skolo, ĉi-foje vi legos pri la fama verkisto W. Auld, en kies verkoj ĉeestas voko de Printempo, Amo kaj Espero. Pri la Amo estas fajna rakonto de nia leganto V. Opletajev "Virino serĉas amorulon".

En la rubriko "Diversaj ondoj de bunta mondo" vin atendas fabelo de fratoj Grimm, tradukita el la germana kaj recepto de nacia germana manĝaĵo, kiujn kun amo sendis al ni niaj legantoj Cezar kaj D. Kaizer, ambaŭ el Althenburg, Germanio.

La redakcio restas kun la espero, ke publikaĵoj de tiu ĉi numero iĝos katalizilo por krea aktiveco de ĉiuj niaj legantoj.

Bonan printempon!

KOMENCANTO

2003 numero 2 // (40) // 6 numeroj jare
regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2003:

internacia tarifo: 15 eŭroj aŭ \$15;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: \$13;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

rusia tarifo: 150 rusiaj rubloj postmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. яд. 132.

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K".

La sola kondiĉo - nepre menciigi KOMENCANTO'n,
la nomojn de la aŭtoroj kaj ties loglokojn.

Esperanto pro la unua amo

Eble mirige, sed jes: la vojon al Esperanto montris al mi – la unua amo! Sekreta, platona kaj cetere neniam reciprokita amo al tre bela kaj inteligenta – 10-jara samklasano. Ŝia nomo estis Sonja kaj estis por mi tre agrable spiri la saman aeron kaj resti en ŝia proksimeco ankaŭ posttagmeze, en Esperanto-rondeto, kiun fondis kaj gvidis la vicdirektoro de nia baza lernejo kaj fervora esperantisto, sinjoro Ŝpiguth.

Forpasis jardekoj, pri la unua infana amo restis nur bela rememoro kaj la 10-jara belulino delonge forlasis mian koron kaj ankaŭ Esperanton. "Mia unua amo" tamen malfermis al mi pordon al nekonata, mirinda mondo – kaj certe lasis sur la sentema knaba animo agrablajn rememoron: Esperanto kaj la unua granda amo...

La fervoro al Esperanto vers'ajne estas infekta malsano (ĉu vere "malsano"? Ĉu ankaŭ "sano" povas esti infekta?).

Dum mia junula aĝo mi havis multajn geamikojn kaj multaj el ili montris sinceran intereson ekkoni la mondon "malantaŭ la verda pordo". Mi do fariĝis kursgvidanto, klubestro, fondis kaj estris junularan sektion de nia landa asocio, organizis klerigejon por junaj esperantistoj kaj internacian someran junularan E-lernejon, esperantistajn balojn kaj karnavalojn... Al mia E-kurso tiam aliĝis ankaŭ junaj muzikistoj, kiuj opiniis ke Esperanto estas simila internacia lingvo kiel la muziko mem. Ni do kunigis la du ideojn kaj la grupo "Teamo" la unuan fojon prezentis sin al la publiko dum Internacia Junulara Konferenco, kiun mi organizis en la slovak urbo Dolny Kubin (1981). La koncerton partoprenis ankaŭ Perla Martinelli kaj Giorgio Silfer el la eldonejo "Literatura Foiro", kiuj poste eldonis parton de la koncerto sur Esperanta Songazeto (2/1983). Kiam la muzika grupo "Teamo" komencis profesion kareeron, ĝi proponis al mi ke mi estu ĝia manaĝero (impresario). Mi forlasis mian tiaman profesion (fakestro en paperindustria fabriko) kaj organizis la vivon de la grupo: koncertoj, radio, televido, ĵurnalistoj, miloj da fanoj. Dum dek jaroj ni faris pli ol mil koncertojn, eldonis milionon da diskoj kaj atingis pintan popularecon en la tiana Ĉeĥoslovakio: ekzemple en la plej prestiĝa ĉeĥoslovaka muzika enketo "Ora Najtingalo" ĝi gajnis en tri sinsekvaj jaroj la unuan premion. La unuan diskon ni eldonis ankaŭ en Esperanto (Ora Team, Literatura Foiro) kaj en la jaro 1989 la grupo faris turneon



kun E-programo, koncertinte dum la 74-a Universala Kongreso de Esperanto en Brajtono (Britio), la 45-a Internacia Junulara Kongreso en Kerkrade (Nederlando) kaj la 62-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda en Illertissen (Bavario, Germanio).

Ankoraŭ dum la junula aĝo mi aktive ekinteresiĝis pri Esperantaj gazetoj: unue verkante por ili artikolojn kaj lingvajn ludojn (krucenigmojn), poste mem redaktante ilin: Esperantisto Slovaka, Esperantista Vegetarano, Heroldo de Esperanto kaj nun - la revuo Esperanto. La Esperanta fajro, kiun bruligis mia unua amo, vers'ajne amc brulos dum mia tuta vivo...

Amike salutas kaj sukcesan, amplenan jazon 2003 al la legantoj de "Komencanto" deziras

Stano Marček

Sur la foto: survoje al Roterdamo, printempo 2002 (foto: Viktor Marček, la filo)

La tria periodo de esperanta literaturo

La skota skolo

Daŭrigante nian rakonton pri la aŭtoroj de la skota skolo, ĉi-foje ni prezentas al vi elstaran personon de Esperanta kulturo kaj literaturo, faman verkiston William Auld. Li estas talentoplena homo, kiu dum multaj jaroj energie kaj diversflanke laboris por Esperanto, estinte Prezidanto de la Akademio de Esperanto, vicprezidanto de UEA, redaktoro de "Esperanto" kaj ankaŭ nun fidele servas al nia lingvo.

William Auld naskiĝis en 1924 en Erith (Suda Anglio), ekde naŭjara aĝo loĝas en Skotlando. Lia patro estis inĝeniero kaj samtempe kapabla poeto, aŭtoro de komikaj poemoj. Ankorau en 1936, dum sia lernado en Glasgova lernejo, W. Auld, estinte aktiva skolto, trovis la skoltajn promeson kaj leĝaron en Esperanto-lingvo. Iom poste lia skoltestro donis al li lernolibron de Esperanto. Mem W. Auld tiel rememoras pri sia esperantistiĝo: "Mi tralegis ĝin (lernolibron - la red.), iele-iome ekkaptis la lingvon kaj neniam plu forlasis ĝin. Eĉ dum la milito, kiam mi servis en la armeo".

Kiam venis la milito, familio de Auld transloĝiĝis al Helensburg, kie William ankorau dum tri jaroj frekventis la liceon. En Helensburg li aliĝis al porjunula flugkorpuso, kaj poste, en 1942, atinginte 18 jarojn, aliĝis al la flugarmeo. En aŭtobiografio W. Auld interese rakontas pri sia pilotiĝo dum la milito: "En 1944 mi sukcesis gajni inter kvindek kandidatoj la unusolan pilotecon en "Spitfire" por "alta spionado" — t.e. observado kaj fotado de alto ĝis 40 mil futoj. Alia tasko estis direkti la artileriajn atakojn. Bonega aviadilo! Mi spionpilotis kaj fotadis ĝis la fino de la milito en la Norda Afriko, Proksima kaj Meza Oriento, Italio, Grekio kaj la finon de la milito mi renkontis en Palestino."

Novembre de 1946 W. Auld revenis al Britio el eksterlanda servo kaj iom poste iĝis studento de Glasgova universitato pri la

angla lingvo kaj literaturo. En tiu tempo li eksciis pri Glasgovaj Esperanto-grupoj, la neŭtrala kaj la laborista, aliĝis al ambaŭ kaj komencis aktive agi — post dek unu jaroj post la eklekto de la lingvo.

En 1947 aperis nova revuo "Esperanto en Skotlando", al kiu W. Auld dekomence aktive kontribuis, poste, fine de 1949, fariĝis ĝia redaktoro. Pli malfrue li redaktis ankaŭ multajn E-periodaĵojn: organon de UEA "Esperanto" en 1955-58, revuojn "Norda Prismo", "Fonto" kaj "La Brita Esperantisto".

En 1952 W. Auld edziĝis kun Meta Stewart. Pri tiu evento de sia vivo li rememoras jene: "Kiam Meta kaj mi intencis nupti, Meta petis min konsenti pri la religia ceremonio pro ŝiaj gepatroj, kiuj ne estus feliĉaj, se pastro ne benus nin. Sed trovi pastron por ateisto, kia estis mi, ne estis facila afero. Mi petis pri tio al John Dinwoodie, sed li rifuzis, ĉar li konis miajn sentojn pri la religio. Fine, la pastro de mia patrino akceptis la taskon, kaj ni havis religian ceremonion, tamen ne en preĝejo; kaj la pastro parolis pri mi sufiĉe degne kaj esperante pri mia konvertiĝo".

En 1956 W. Auld kvalifikiĝis kiel instruisto, ricevis instruistan postenon en la urbeto Johnstone, okcidente de Glasgovo. En 1960 li iĝis ĉefinstruisto en literatura fako de liceo en urbo Alloa, kaj en 1963, kiam li kun la familio transloĝiĝis en u. Dollar, li iĝis vicestro de tiama liceo kaj okupis tiun postenon ĝis la emeritiĝo.

La verkado ĉiam estis la granda bezono de W. Auld kaj li ĉiam trovis originalan formon en la esprimo de siaj sentoj. Lia unua poemaro sub nomo "Spiro de l' pasio" aperis en 1952 en poemvolumo "Kvaropo" (pri kiu ni jam skribis en la antaŭa numero de "K").

En 1956 estis eldonita la poemvolumo "La Infana Raso". Tiu ĉi verko okupas apartan lokon en la

literatura agado de William Auld: ĝi alportis al li grandan popularecon kaj ĝeneralan rekonon. La Poemaro konsistas el 25 "kantoj", kiujn interligas la penso, ke la homaro vivas ankoraŭ sian infanaĝon kaj havas esperon elkreski el sia sovaĝa primitiveco.

Post "La Infana Raso" el sub la plumo de W. Auld sinsekve aperis multaj poemplibro: "Unufingraj Melodioj" en 1960, "Humoroj" en 1969, "Rimleteroj" en 1976, "El unu verda vivo" en 1978, kiuj bone prezentis lin kiel originalan verkiston.

Sed ankaŭ la tradukarto okupis gravan lokon en literatura laboro de W. Auld. "Mi tradukis multe, ekzemple, la tutan sonetaron de Ŝekspiro..., sed krom Tolkien ("Mastro de l' Ringoj" — de red.) mi fieras precipe pri scienc-fikcia poemo *Aniaro* de svedo Harry Martinson. Mi enamiĝis al tiu verko. Oni konas ĝin sufiĉe vaste, ekzistas eĉ opero pri ĝi; sed la angla traduko estas tute aĉa, dum la germana estas pli bona" — rakontis la verkisto en aŭtobiografio.

W. Auld kunkompilis kaj redaktis la "Anglan Antologion", eldonitan en 1957, por kiu li virtuoze tradukis nemulte malpli ol duono de la poezia parto.

Lia grava merito estas ankaŭ la redakto de "Esperanta Antologio". Li mem tiel rakontis pri la apero de tiu ĉi 640-paĝa volumo: "Mi ne pensis reldoni ĉion, sed mi konsciis, ke mi bezonas tutsimple antologion de la originala poezio. Kaj mi kompilis ĝin unuavice por ke mi havu ĝin... Kvankam kelkaj nuntempe opinias, ke la *Esperanta Antologio* devus enhavi pli multajn poemojn de malpli multaj aŭtoroj, oni devas konsideri, ke tiutempe temis pri la unua antologio, kaj tute mankis simila materialo. Kaj mi sentis la gravecon de la historio de nia poezio, sekve mi volis montri laŭeble plej klare la vojon de la poezio en la ordo kronologia."

Aparte menciindas Esperanto-lermolibro, kies aŭtoro estis W. Auld. Lia anglalingva Esperanto - lernolibro estis poste tradukita por germanoj kaj por svedoj. Aperinta en 1968 en Esperanto lia lernolibro "Paŝoj al Plena Posedo" atingis jam kelkajn eldonojn. Ĝi enhavas 30 "paŝojn" (lecionojn) kun vortolisto kun koncizaj E-difinoj, kun fragmentoj el originalaj aŭ tradukverkoj de E-klasikuloj por lego kaj kun bona ekzercaro.

En 1976 aperis profunda lingvoesploro de W. Auld "Facetoj de Esperanto" pri nia poezia lingvo, pri transskribo de propraj nomoj, en 1978 — eseoj "Pri lingvo kaj aliaj artoj".

Per sia mirinda agemo sur multaj laborkampoj W. Auld havigis al Esperanto multajn sukcesojn. Fine de aŭgusto 1998 li estis proponita por ricevi la Nobel-Premion por literaturo. Jen kiel li rakontis pri tio ĉi: "La kandidatigo estas granda honoro por mi. La kunmeto de la nomoj Nobel kaj Esperanto devigas respekton por nia lingvo kaj ĝia literaturo. Kompreneble mia ŝanco fariĝi la verkisto de la jaro en la tuta mondo estas tre malgranda, sed konsolas min, ke internacia elekto-komitato, formita dank'al la iniciato de *La Ondo de Esperanto* proklamis min *La esperantisto de la Jaro 1998*. Kvankam, kion mi faras, mi faras apoge al la grandioza koncepto de Zamenhof, kaj mi ne aparte serĉas propran renomon, ne estus nature, se mi ne plezurigus pro honorigo fare de miaj kunkulturanoj."

Karaj legantoj! Nian prezenton de la verkisto finas kelkaj liaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj.

Tradukitaj poemoj

William Shakespeare Soneto 130

L' okuloj de la sinjorin' ne sunas;
ol ŝiaj lipoj ruĝas pli koralo;
se blankas neĝo, mamoj ŝiaj brunas;
se haroj dratas, nigras la drataro.

Vidiĝas rozoj ruĝ' - kaj blank-kostumaj:
tiajn sur ŝia vang' mi ne admiras;
odoroj ofte ravas pli parfumaj
ol tiu, kiun la mastrin' elspiras.

Mi amas ŝian voĉon, sed pli bela
sonoro ofte en muzik' troviĝas.
Diino ŝi ne estas surĉie'a —
mastrino mia sur la ter' moviĝas.

Sed mia kara — je ĉiel'! — pli raras
ol ĉiuj, kiujn oni falskomparas.

John Ronald Reuel Tolkien

El "La Mastro de l' Ringoj"

Mi sidas apud fajr, pensante
pri l' vivo konsidere,
pri razenfloroj, papilioj,
viditaj prasomere;

pri foliflavo kaj filandro
aŭtune fantaziaj,
kun nebulet' kaj sun' arĝenta,
kaj vent' tra l' haroj miaj.

Mi sidas apud fajr' pensante
kia la mondo estos
dum vintro, kies primaveron
mi mem ne vivatestos.

Ĉar multas la aferoj, kiujn
ne konis miaj spertoj:
ja ĉiujare dum printempo
malsamas arbaj verdoj.

Mi sidas apud fajr', pensante
pri l' homoj de l' fondiĝo,
kaj tiuj, kiuj vidos mondon
post mia elmondiĝo.

Sed dum mi sidas kaj pripensas
pratempajn memorkroĉojn,
mi volus aŭdi revenantojn
kaj ĉe la pordo voĉojn.

Originalaj poemoj

Ho bele, esti juna

Ho bele, esti juna
en nokto freŝe blova,
stari sub mildo luna,
sin senti ĉionpova,
konscii senson flaran,
atendi sian karan...

Neĝo

Pestsilenta
la neĝ' invadas,
venkas la urbon;
kaj ni,
popol' venkita,
marŝas senespere la stratojn
kun nuko kurba
sub juĝ' de l' okupanta
armeo blanka.

Printempo, helpon!
Kiam ni aŭdos
fanfaron vian
ĉe l' horizonto?

Vi estas maro

Vi estas maro, kiun mi navigas
sen kompasnadlo, sed kun gvidaj steloj;
sur via sino hula min kavigas
ventegoj, aŭ min lulas zefirpeloj...
Kaj malgraŭ fridoj, spite al la tromboj,
animo mia ĝojas sur l' ondaro:
mi volas veli plu sur viaj ondoj,
kaj fine droni, droni en la maro...



Santi Elena Bullo [Meestre, Italio]

Vladimir Opletajev]
[Surgut, Rusio]

Originalaj verkoj de niaj aŭtoroj

Virino serĉas amorulon

En varma aprila frumateni, farinte rutinajn aferojn hejme kaj modere ŝminkinte sin, ĉar la troa uzo de vizaĝaj ornamaĵoj precipe ne estis ŝia trajto, Nina kiel kutime rapidis al apuda haltejo por enbusiĝi kaj post kvaronhoro atingi lernejon, kie ŝi jam dum kelkaj jaroj estis instruanta kemion al dekklasanoj. Malmultajn minutojn de busveturo ŝi uzis por difinitive rekonsciigi de la matena hektiko kaj iom ĝui — almenaŭ tra la busa fenestro — la duondorman trankvilon de vekiganta urbo kaj striojn de sunradioj gaje ornamantajn mallarĝajn spacojn inter la noktaj ombroj de domegoj. Alian eblecon por senzorge vidi la eksteran mondon ŝi preskaŭ ne havis, ĉar dum monatoj ŝia tuta vivo, persona kaj profesia, estis dediĉata al senĉesaj edukaj klopodoj.

Nina tre ŝatis la kemian fakon kaj penegis abnegacie per siajn riĉajn universitatajn sciojn al gelernantoj. Ŝi apartenis al tiaj homoj, kies impulsa ekstazemo sur la profesia kampo estas preskaŭ netolerebla kaj montriĝas truda al plimulto da lernantoj interesigantaj nur surface pri sciencoj el deviga lerneja leciontabelo. Domaĝe, la juna instruistino ne konsideris malrespekta la nekaŝitan flegmon rilate al kemio kaj senrezerve pluportis la torĉon de scioj sur senfina vojo de amasa indiferento kaj klerigo.

Estas klare, ke per la torĉo ŝi kapablis lumigi nur kelkajn scivolemajn apudstarantojn, kiujn ŝi konsideris siaj plej kapablaj lernantoj. Inter ceteraj Nina aparte atentis du amikojn — vere talentajn kaj scivolemajn knabojn, kiuj antaŭ nelonge brile prezentis la bonajn sciojn en la urba kemia olimpiko. Ŝi tre favore rilatis al ĉi tiu inteligenta kaj aktiva pareto krom aprobi ĝiajn senbri-dajn petolaĵojn. Jes, ŝi nomis tion petolaĵoj, sed efektive la fantaziaĵoj de la inventema duopo pli similis al drasta artifiko, por Nina senescepte surprizaj, kaj pro tio preskaŭ ĉiam nerepuŝeblaj. Kiam ŝi estis ironia en ilian klason por lekciĝi aŭ fari laboratorian taskon, ŝi nevole streĉis sin atendante ian bagatelan ruzajon, kiun ŝi ne kapablis tuj adekvate rebati.

Tio estis permanenta neanoncita batalo inter du teamoj, kaj la unuopa partio de Nina ofte malgajnis, kiam ŝi malatente sidigis sur lerte subŝovitan malsekan tabulviŝilon aŭ seĝon ŝmiritan per kredo; kiam ŝi tiris tablotekon, kaj el tie saltis malgranda ĝismorte timigita museto; kiam meze de leciono subite falis sur plankon portreto de fama kemiisto. La konsekvenca enketado ĉiufoje atribuis la okazintaĵojn al ia ekstera faktoro, sed Nina sciis certe, kvankam senpruve, kies manoj amuze lertumis ĉirkaŭ ŝia persono.

La hodiaŭa tago, aŭgurita de serena mateno, pasis sukcese, sen provokadoj, kaj ŝiaj amataj lernantoj, kvankam milde kaj inside ridetis al ŝi en la leciono, estis ekskluzive ĝentilaj kaj perfekte respondis hejmajn taskojn. Nina, bonhumora kaj kontenta pri la lecionoj, surmetis posttagmeze mantelon kaj optimisme puŝis la lernejan pordon por revenonte hejmen denove ekvidi la eksteran mondon kaj distri sin per stratvidaĵoj. Promenante ŝi direktis sin al la busa haltejo, aĉetis dumvoje gazetojn kaj nutraĵojn kaj ĝuis homamason, en kiu ŝi ne fartis solece, ĉar hejme ŝin atendis izoliteco de simpatia sed senfamilia virino, kiu dediĉas multan tempon al preparado de morgaŭaj lecionoj, referaĵoj kaj stako da infanaj kajeroj.

Pacience atendante la buson, Nina lasis la printempan sunon feble karesi sian vizaĝon kaj ridetis senzorge al la varmaj radioj, ĉar ŝi estis juna kaj feliĉa. Ŝin agrable surprizis apude starantaj homoj, ĉar ankaŭ ili, vidante la kontentan vizaĝon de Nina, jen strabe okulumis al ŝi, jen afable ridetis kaj eĉ per mansvingoj salutis ŝin. En ilia konduto sentebliis la neordinara kaj nedivenebla trajto, ĉar ne povis ja ĉiuj busatendantoj ĉirkaŭe koni kaj amike saluti ŝin. Ŝi sentis sin kiel naskiĝtagulino dum festeno. Sed plie, ŝi estis ĝis perplekso konfuzita de juna altstatura kaj simpatia viro, kiu subite alparolis ŝin familiare per strange arogeta frazo: — Mi opinias, ke ĝuste mi estas via serĉato...—

Ĉu vi certas, ke mi iun serĉas aŭ tiel donjuane vi praktikas fikonatigon kun surstrataj sencerbulinoj? — ofensivis ŝi krude.

— Ho, pardonu, mi ne celis vin ofendi, — respondis la juna viro. — Sed mi estas libera - li ŝerce prezentis al ŝi la fingrojn sen fianĉingo - kaj probable kongruas kun viaj bezonoj kaj dezirataj preferoj.

— Pri kiaj preferoj vi balbutas? - indiginigis Nina pro liaj implicitaj aludoj.

— Ĉu ne la printempo instigas vin al rabel-ezaj paroloj, vi naiva aroga molestulo? La molestulo konfuzigis pro ŝia abrupte rigora reago kaj, ne sciante kiel pli konvene elturniĝi el tikla situacio, nur staris senvorte kaj rigardis ŝin mute per siaj verdaj printempaj okuloj. Nina ankoraŭ intencis dece eduki lin per porcio de spicaj riproĉoj, sed venis ŝia buso kaj ŝi sen diri plian vorton kuglofaĵe impetis en la veturilon. Tra la fenestro ŝi vidis homojn stari ĉe la haltejo kaj gaje rideti ŝin.

La stranga epizodo malekvilibrigis ŝin tiel forte, ke ŝi povis rekonsciigi nur veninte hejmen. Ŝi metis tuj la saketon ĉe la pordon kaj tirante de sur la ŝultroj la mantelon subite ekvidis sur ĝia dorsa parto ian paperfolion. Surprizite de la malkovro, Nina konsternite tralegis grandliteran anoncon: "Atenton! Juna virino serĉas pasian amorulon, por longa tempo. Telefono...".



logonta ŝin de ĉagrenaj travivaĵoj. Levinte la aŭskultilon ŝi ekaŭdis emocian nekonatan viron voĉon:

— Bonan vesperon. Estas mi, kiu ŝercofende alparolis vin tage ĉe la haltejo. Mi konfesas ke mi kondukis malĝentile kaj pardonpetas vin. Supozeble, vi ne konjektis tiumomente pri la provoka skribaĵo sur via mantelo. Bonvolu ne konsideri miajn vortojn ofendaj. Mi tre petas vin. - La nekonato diris la frazojn rapide, por ke Nina aŭskultu lin kaj ne jetu la aŭskultilon.

Embarasita de la telefona monologo, Nina rememoris tuj la junan viron, kun kiu ŝi kverelis ĉe la bushaltejo kaj la tutan situacion kaj respondis pacige, ke ne li kulpis pri la ŝerco, sed ŝiaj lernantoj, kiu alpinglis al la mantelo ĉi tiun fianoncon, ke ŝi nun tre bedaŭras siajn drastajn esprimojn. La nekonato muris mildaride pri tiaŝpecaj petoloj, kiujn riskas entrepreni ŝiaj lernantoj probable ne pro la senbrida hasto kontraŭ ŝi, sed nure pro la junaĝa aventurismo. La sama aventurismo instigis ankaŭ lin senpripense alparoli ŝin kaj, memorfiksinte la telefonnumeron de Nina, li decidis humile peti ŝin renkontiĝi en iu kafejo por paciĝi kaj konatiĝi.

Nina hezitis iom pri respondo, sed intrigita de liaj sincera voĉo kaj pento, konsentis veni al la fatala haltejo, kie li promesis ŝin atendi. Kiam post duonhoro Nina elbusiĝis, ŝi ekvidis lin kun bukedo de malgrandaj printempaj floroj. Li ridetis renkonte al ŝi kaj konfuzite rigardante per siaj verdaj okuloj ne tre decidvoĉe demandis ŝin, ĉu ne li estas ŝia serĉato.

— Kiu scias nun, kiun mi serĉis kaj trovis reklamante min frivole en la stratoj kun la idiota serĉanonco surdorse? — Respondis Nina etendante la manon al li por iri al lumigita kafejo. En ĉi tiu momento ŝi ankoraŭ ne sciis, ke tiel kurioze, dank' al senbrida petolaĵo de amataj lernantoj ŝi renkontiĝis kun sia estonta edzo.

Jen tiel ĉi... - ŝi ekkomprenis la suspektindan konduton de la ĉirkaŭantoj kaj tra ŝia kapo ekzigzagis senhelpe nekonkretaj fragmentoj de lamentaj pensoj - mi paŝis tra la strato kun la stulta aŝiŝo surdorse. Kaj mi nomis lin aroga molestulo. Neprave! - Rememoris ŝi la verdokulan alparolinton ĉe la haltejo. - Mi mem reklamis min malvirte meze de la urbo, kaj ĉiuj rikane mokis min. Ho, kiel hontinde estas, aĉe! - Nina forŝiris furioze la paperpecon de la mantelo kaj tuj stumblis ĉe la demando: kiu faris tion.? Ĉi foje ŝi ne bezonis longe trakti la okazaĵon sinteze por identigi la ku;pintojn. Estis ili, la amuzuloj, kiuj hodiaŭ perfekte raportis en la leciono! Hipokrituloj! Ŝi decidis fari morgaŭ grandiozan skandalon. La troa impertinenteco de la pareto povis skui ŝiajn aŭtoritaton kaj respekton, kaj ĉi tiun limon ili ne rajtis transiri. Neniakaze! Sed ho ve, morgaŭ estas dimanĉo, kaj almenaŭ por la diurno la knabetoj neatingeble evitos ŝian justan punon. Aĉe! La tago estis difinitive fuŝita.

Vespere provis Nina ne tre sukcese distri sin per legado de aventura libro, sed la propra aventuro obsedis ŝin kaj malagrable mordadis la animon. Ŝi sencele vagis tra la loĝejo. En la kapo svarmis obtuzaj malklaraj voĉoj. Ili rikane sugestis al ŝi pliajn paŝojn de eventuala kompenso pro sperdita malhonoro.

Subite eksonoris telefono, kaj Nina kun ĝojo kaj faciligo aŭdis ĝian sonoron, atendante negravan virinklaĉan parolon kun iu el kolegiinoj for-



Yves Brusio [Douarnenez, Francio]

Herbero

Ne urĝu vin
kaj rigardadu
la herberon
ĉe via sojlo
kaj la roson
sur la herbero.

Cezar

[Altenburg, Germanio]

**Chaplin en
Parizo**

Homo kara en Parizo,
Chaplin sur la strato,
mi por vi poemon skribas
kiel via frato.

Mi de vi nenion scias,
eĉ ne aŭdas vorton,
sed amiko, mi admiras
vin kaj vian forton.

Homo rara vi ja estas,
de artista grando,
kun melono sur la kapo —
belo de la lando.

Via mondolingvo muta,
via palpebrumo
montras, ke la homo estas
pli ol nur kostumo.

Kiel vi la kisojn ĵetas
En pariza parko,
tio estas majstroverko
ne de iu ŝarko.

Tio estas ja mesaĝo
el pli bona mondo,
mi vin dankas, kamarado,
gaja vagabondo.

Restu forta, mi deziras,
kontraŭ la enuo,
plu silentu, kara mimo,
meze de la bruoj.

Paŝtejo


Sur la blua herbejo de la ĉielo
Duon-kaŝita per la hurdo
De la salikoj,
Roza ŝafideto
Paŝtigas, kviete,
Kaj iras
Pelata de la kareso
De ĝoja aprilo.

*

Urĝu, Printempo!

Urĝu vin!

Ĉar Aprilo vin atendas.



Vinnikova Nina [Barnaul, Rusio]

Santi Elena Bullo [Mestre, Italio]

Hazarde

Estis bela printempa
mateno. Sinjorino Mirka mal-
fermis la pordon de sia domo
kaj rigardis. La ĉielo estis
kovrita per strekoj ruĝetaj kaj
lazuraj. Dum ŝi staris ĉe la so-
jlo, iu senbrue glitis en la
kuirejon. Estis Mora, nigra ka-
tino. Ŝin sekvis la kato Bruno,
kiu eksidis sur seĝon, karan al
li. Mirka fermis la pordon kaj
siavice eksidis en sian fotelon.
Tiam al ŝi venis Bruno, kaj la
virino karesis longe orelojn de
la kato. Kiam li revenis al sia
loko, sur la genuojn de Mirka
eksaltis Mora.

Mirka plezure karesis la
katinon, kiu danke ronronis.

Post nelonge Mirka ek-
staris kaj portis la manĝaĵon al
la katoj en la ĝardenon. Sur-
prize ŝi ekvidis belan grizan
katon, kiu laŭte petis almozon.
La virino donis al ĉiuj bongus-
tajn nutraĵojn kaj ĉiuj trankvile
manĝis.

Tiel okazis plurfoje,
matene kaj vespere.

Fine, iun tagon, sinjoro
Andrej, la najbaro de sinjorino
Mirka, revenis hejmen antaŭ la
kutima horo. Li ekvidis sian
katon kaj ekkriis:

— Ho, ruza kato! Jen la
kialo! Nun mi komprenas, kial
foje mia Veko ne manĝas ĉe
mi. Li preferas vian kuirejon!

Mirka ridetis kaj afable in-
vitis Andrej, malferminte la
kradpordon. La viro volonte
eniris en la ĝardenon kaj eksidis
apud Mirka sub la arbo, kiu jam
havis verdajn foliojn.

Ili afable interparolis dum
la katoj plezure ludis.

Tielmaniere povas komen-
ciĝi daŭra amikeco kaj eble eĉ
io pli...

Gramatiko ŝerce kaj serioze

Vŝivceva Tatjana
[Miass, Rusio]

Best-aboco

Aglo flugas en ĉielo,
Ankaŭ mi ekflugi celas.

Bok' babilas kun ĉevalo —
Blekas ambaŭ en la stalo.

Cervo batas per hufeto,
Certe kuri estas preta.

Ĉamo saltas kun protesto —
Ĉagreniĝas ĉarma besto.

Dogo lerte kaptas pulojn —
Distras bebojn, diboĉulo.

Erinaco snufas softe,
Evidente tristas ofte.

Foko estas besto forta —
Flosas mare kun komforto.

Gruo staras sur la tero,
Gambon tenas en aero.

Ĝirafid' la kolon tiras,
Ĝi la patron tre admiras.

Ho, hirundo flugas, vidu!
Hastas nutri hirundidojn.

Sur balkon' ĥameleono
Tre similas al balkono.

Indiĝeno — estas ulo,
Izolita sur insulo.

L. L. Zamenhof

LINGVAJ RESPONDOJ

Ni volas konatigi vin kun plej interesaj fragmentoj el "Lingvaj Respondoj", kiujn faris nia Majstro dum la unuaj jaroj post la apero de Esperanto. Eble vi trovos ion interesan por vi kaj povos vidi, kio interesis la unuajn esperantistojn en la gramatiko de nia lingvo. Por komenco ni publikigas Antaŭparolon kaj la ĉapitron pri apero de la nomo Esperanto.



Antaŭparolo

Komencante de Decembro 1906, mi, per *La Revuo*, de tempo al tempo donadis respondojn al diversaj demandantoj pri diversaj lingvaj demandoj. Tiuj respondoj havis karakteron pure privatan, tiel same kiel la respondoj, kiujn en diversaj gazetoj donas aliaj kompetentaj Esperantistoj. ... Tamen ĉar certa nombro de miaj Respondoj jam estas publikigita kaj ĉar oni eble povus trovi en ili ian utilan konsilon, tial mi opinias, ke ne malutilos, se ili estos reeldonitaj kune en formo de aparta broŝuro.

La Revuo 1910

L. L. Zamenhof

Deveno de la nomo "Esperanto"

... La nomo de nia lingvo ne estas elpensita, kaj jen estas ĝia historio: Eldonante la unuan lernolibron de nia lingvo, mi prenis por mi la pseŭdonimon "Esperanto"; la lingvo mem havis nenian propran nomon kaj estis nomata "la lingvo internacia proponita de Esperanto". Pro oportuneco oni komencis uzadi la esprimon "lingvo de Esperanto"... aliaj esprimoj, kiujn kelkaj provis uzadi (ekzemple "la lingvo internacia", "la internacia"), montris sin neoportunaj kaj ne enfortikiĝis, ĉar ili estis ne bone elparoleblaj, ne memoreblaj por la publiko kaj prezentis nenion difinitan (ĉar sub "lingvo internacia" oni povas egale bone kompreni la Volapükon aŭ aliajn proponitajn projektojn). Baldaŭ montriĝis, ke nur la vorto "Esperanto" (sole aŭ kun aliaj vortoj) klare diferencigas nian lingvon de aliaj, kaj multaj amikoj komencis baldaŭ en siaj leteroj aŭ artikoloj uzadi simple la solan vorton "Esperanto", ekzemple "la afero Esperanto", "skribi en Esperanto" k.s. Tiel iom post iom ellaboriĝis unuvorta nomo de nia lingvo. Vidante, ke mia komenca pseŭdonimo transiris al la afero mem kaj ke ĝi estas tre oportuna, mi baldaŭ tute ĉesis uzadi mian pseŭdonimon, kaj ĝi restis nur kiel nomo por la afero mem. La nomo "Esperanto" estas per si mem tute senlogika; sed en sen-signifa kondiĉa nomo kial ni bezonas logikon?

La Esperantisto, 1890, p. 60.

Tempo kaj homoj

Por tiu ĉi malnova rubriko kelkaj niaj legantoj sendis rakontojn pri la propraj travivaĵoj, rememoroj, impresoj, ligitaj kun Tempo. Sub la titolo "Bildoj de infaneco" ni prezentas rakonton de Eric Walker, Honora Sekretario de Brita E-Asocio, nia peranto en Britio kaj fidela leganto de *Komencanto*.

Eric Walker [Ipswich, Anglio]

Bildoj de infaneco

Fakte, ju pli aĝa mi iĝas, des pli ofte mi pensas pri mia vivo, kiam mi estis juna knabo. Mi ne scias kiel detale skribi. Mi sentas ke povus skribi multon, sed eble tio estus enuiga.

Do, mi komencas de la fundamentaj esencoj: mi naskiĝis en 1925 ĉe la ne edziniĝinta patrino, kiu baldaŭ poste elmigris al Skotlando, lasinte min kun mia avino, kiu ankaŭ estis ne edziniĝinta patrino. Do, tute ne estis patro aŭ avoj en mia vivo! Ni vivis en tre malriĉa kvartalo de la urbo Nottingham en Anglio. Nottingham estis industria urbo en la mezo de Anglio, ĉefe fama pro la legenda rabisto 'Robin Hood', kiu rabis la riĉulojn kaj helpis la malriĉulojn. Ĉi tiu aĉa distrikto havis la nomon 'The Meadows' (La herbejoj). Tute ironia nomo, ĉar ne kreskis tie arboj aŭ eĉ unu peco de herbo! Estis nur linioj de domvicoj. Ĉiu domo estis malgranda, nur du etaj ĉambroj je la grundetaĝo kaj du je la unua etaĝo, plus malgranda kuirejo. Ne estis banĉambroj kaj por atingi la necesejon oni devis eliri el la domo kaj iri al la korto malantaŭ la domo, tie ankaŭ estis la budo, kie ni tenis la karbon por la fajroj. Kiam oni eniris la domon de la strato, oni eniris rekte en la antaŭan ĉambron. Ĉi tiu ĉambro normale havis la elegantan nomon "la salono" kaj kutime oni ne uzis ĝin, nur kiam estis festoj. Ĉar la ĉambro estis preskaŭ ne uzata, ĝi estis tre humida. Ĉiuj ĉambroj estis malgrandaj, eble 9 metrojn kvadratajn. La malantaŭa ĉambro estis la plej uzata. Tie ni manĝis kaj vespere sidis kaj aŭskultis la radion, ne estis TV tiam.

Fakte oni ne uzis la vorton "radio", sed "senfadeno". Malantaŭ de ĉi tiu "sidĉambro" estis la tre eta kuirejo kaj tie estis la pordo, kiu malfermiĝis al la korto, kie estis la necesejo. La korto estis dividita kun la apuda domo, kiu estis tute simetria kun la nia, sed en la mala maniero. La korto estis sufiĉe malgranda, nur 7 metroj je 7 metroj kaj ĉe la fino de ĝi estis piedvojo, kiu preterpasis ĉiujn domojn en la strato.

Do, tie mi loĝis kun mia avino dum miaj fruaj jaroj. La vivo estis sufiĉe agrabla, mi ne sentis ke ni estas malriĉaj, kvankam mi malklare konsciis, ke ekzistas alia mondo de riĉuloj. Dimanĉe kun mia avino ni promenadis en aliaj urbkvartaloj, kie la domoj estis grandegaj, havis ĝardenojn (ni tute ne), havis aŭtomobilojn, servantojn, k.t.p. Ankaŭ semajne ni vizitis la kinejon, kie ni vidis filmojn pri vakeroj kaj ruĝindianoj, kaj muzikajn filmojn, kaj pri riĉaj familioj. Estis loka kinejo (tiam en Nottingham estis 45 kinejoj!). Nia najbarino estis maljuna

lino, vidvino, kaj ni aranĝis tiel, ke ŝi ankaŭ vizitu la kinejon semajne, sed ne al la sama kinofilmo. Vespere la du virinoj interŝanĝis ege detalajn priskribojn de la filmoj, kiujn ili vidis. Ofte al mi estis permesate resti en la ĉambro kaj sidi antaŭ la fajro kaj aŭdi la rakontojn. Mi ankaŭ memoras, ke kiam estis severa fulmotondro, ni sidis je la ŝtuparo, kiu estis en la mezo de la domo, inter du ĉambroj kaj tiam ni pensis, ke ĝi estas la plej sendanĝera loko. Kiam estis ege laŭta tondro, ni uzis la fajr-stangon kaj frapis malantaŭ de la kameno por diri al la aliaj ke ni ankoraŭ vivas!

Mi komencis iri al la lernejo kiam mi havis kvar jarojn, la unua klaso estis preskaŭ "infanĝardeno" kaj ĉiun postagmezon ni dormis sur malgrandaj provizoraj litoj. La lernejo, al kiu mi iris ĝis mi havis 11 jarojn, estis nur tricent metrojn for de mia domo, do mi revenadis hejmen por tagmanĝi. En tiu tempo ne estis multe da trafiko, do malgrandaj infanoj povis iri sendanĝere en la stratoj, tamen oni devis esti zorgemaj, ĉar laŭ la stratoj iris grandaj kamionoj, tirataj de kvar grandegaj ĉevaloj. Ili laboris ĉefe por la fervoja sistemo kiu estis proksima al nia strato.

Mia ĉefa memoro estas pri tio, kiel ni ludis en la strato, kiam estis nebulo. Nebulo ne estis nur en Londono. En mia kvartalo estis kelkaj miloj de domoj. Neniu el ili havis centralan hejtadon. Ĉiu havis unu aŭ eble du karbajn fajrojn samtempe, do multe da fumo eliris el la kamentuboj. Se la aero estis senmova kaj tute mankis vento, la nebulo komenciĝis kaj povis daŭri dum unu, du, ĝis eble kvin tagoj kaj noktoj. La nebulo silentigis la stratojn. La kamionoj devis iri malrapide, kun viroj kiuj gvidis la ĉevalojn aŭ gvidis aŭtojn. Eĉ en la ĉefstratoj, la konduktoroj de la aŭtobusoj kaj la trolebusoj devis marŝi fronte kun lampoj por gvidi la ŝoforojn. Estis nur tramoj, kiuj povus funkcii preskaŭ normale, sed nur iri tre malrapide ĉar ne povus vidi plu ol je 4 metroj. Sed oni jam komencis ĉesi havi tramojn kiam mi havis tri jarojn. (Nun, mi legas ke en Nottingham, same kiel en kelkaj grandaj urboj en Anglio oni planas aŭ jam konstruis novajn tramliniojn.) Do, en tiu silenta kaj preskaŭ funebra etoso ni infanoj ludis. Por ni nia urbo estis la centro de la mondo kaj nia vivo estis tre malvasta. Mi memoras ke estis granda ŝoko por mi, kiam mi eble havis ok jarojn, lerni ke en aliaj landoj ekzistas trajnoj, pontoj k.t.p. Estis stulto, mi scias, tamen ni pensis ke ĉio komenciĝas de ni kaj en nia propra urbo! Eĉ la lingvo. Ni pensis ke estis ni, kiu parolis en la Nottinghama dialekto, kiu parolas la normalan anglan, kaj ĉiuj ceteraj, kiuj havis dialektojn, sed ne ni!



tiel aspektis Nottingham dum tiuj tempoj


Neelpensitaj historioj

elektitaj kaj tradukitaj de niaj legantoj

Pri bestoj kaj plantoj

Cezar [Altenburg, Germanio]

Flugantaj fiŝoj



En raportoj pri marvojaĝoj en la tropikaj regionoj ni legas pri flugantaj fiŝoj, kiujn la maristoj nomas: "flugantaj haringoj". Ili estas proksimume tiel grandaj kiel haringoj, sed krome havas longajn kaj larĝajn brustnaĝilojn. Tiuj "flugiloj" estas duoble tiom longaj, ol iliaj korpoj.

En malgrandaj aroj ili vivas sur la surfaco de la sudaj maroj. Kiam delfenoj aŭ tinusoj persekutas ilin, ili startas kiel aeroplanoj, sed zigzagkurse, tenas la naĝilojn ĉe la korpo, kvazaŭ vipadas per la vostoj la akvon kaj poste ekflugas kiel sagoj. Ili etendas la naĝilojn kontraŭ la vento kaj flugas ĉe favora kontraŭvento ducent metrojn en alto de du metroj de akvo. Poste ili denove sinkas en la akvon. Tiel ili fuĝas de siaj persekutantoj. En okazo de bezono ili tuj denove ekflugas.

Tia fluganta fiŝo flugas ne kiel birdo, ĝi ne remas per siaj longaj brustnaĝiloj en la aero. Ĝi tenas ilin kiel la planeojn de glisilo kontraŭ la vento. Lante movaj filmoj pravas tion.

Zujeva Margarita [Moskvo, Rusio]

En Aŭstralio loĝas duoble pli multe da kanguruoj, ol homoj.

*

Japanio estas la sola en la Universo lando, kie oni ĉiun jaron festas la Tagon de Maraj Algoj!

Soner Sergej [Velsk, Rusio]

Pri la proksimuloj

Oni dresis unu simion paroli en homa lingvo. La simio sufiĉe bone memorfiksas ĉirkaŭ 300 substantivojn. Sed nur unusolan verbon - donu (al mi)!

Waclaw Rekowski

[Starogard Gdanski, Pollando]

Heroo

Estis varma, somera tago. Oni aŭdis voĉon de birdoj kaj kriojn de infanoj baniĝintaj en proksima lageto. Domoj de la vilaĝo estis malproksimaj de ĝi.

Joĉjo antaŭ du semajnoj kun premio finis lernadon de la kvara klaso de la bazlernejo kaj nun li havis feriojn. Joĉjo antaŭ hejmo riparis sian biciklon. Aertubo de la rado estis difektita, do li flikis ĝin kaj pumpis.

Apude, kun ploreco preterkuris vidkonata knabino, lernantino de pli juna klaso de la lernejo. Ŝi loĝis kun sia familio malantaŭ la arbaro kaj nun kuris ĉidirakte.

— Kio okazis? - li demandis?

— Mia... fratino...

— Kio kun via fratino?

— Ŝi dronis...

— Kie ŝi nun estas?

— En la lageto.

— En la akvo?

— Jes.

Joĉjo preskaŭ ne scipovis naĝi. Li prenis la aertubon kaj kurante kun la knabino al la lageto demandis:

— Ĉu neniu estas tie?

— Estas, sed...

Li jam ekvidis. Ĉe la akvo staris tri viroj, kiuj loĝis plej proksime, kaj vigle kunparolis. Proksime staris kelkaj time-maj knaboj. Dume Joĉjo pensis, ke ne estas ŝanco savi la knabinon. El lecionoj de biologio li memoris, ke la homo povas vivi senaere nur dum kelkaj minutoj. Distanco inter la hejmo kaj la lageto estis ĉirkaŭ ducent metrojn.

Unu el la viroj - poŝtisto - paŝis tien-reen en akvo kaj per stango sondis la fundon.

— Kie ŝi estas? - demandis Oĉjo.

— Tie, tie, - oni montris kelkajn lokojn. La knabo naĝis kun la aertubo tie kaj tie sondante fundon per sia piedo.

— Tie, - vokis la ploranta fratino de la dronita knabino.

Jes, ĉi tie. Joĉjo tuŝis ion sube kaj eksentis terurtremon. Li kaptis malvarman manon kaj unumane malfacile naĝis al la bordo. Oni provis revivigi malfeliĉulinon, sed ŝia spiro ne revenis. Venis ambulanco kun kuracisto kaj li konstatis la morton. Poste li longe parolis kun la poŝtisto.

Post du tagoj en la loka gazeto aperis artikolo titolita "Heroa ago de la poŝtisto".



Oni volas tion, kion oni ne havas

AFORISMOJ

El Germania gazetaro kolektis kaj esperantigis Cezar
[Altenburg, Germanio]

Ju pli aĝaj oni iĝas, des pli oni similas al si mem.

Luciano Pavarotti, itala kantisto

Heroo oni povas esti ankaŭ sen dezertigi la teron.

Nicolas Boileau-Despreaux, franca verkisto, 1663-1711

Ankaŭ en reĝa domo oni lernas kiel la simioj lernas — per tio, ke oni imitas siajn gepatrojn.

la brita kronprinco Charles, nask. 1948)

Estas pura disipo de tempo fari ion mezkvalitan.

Madonna, usona kantistino kaj aktorino, nask. 1958

Ĝentileco estas la sekura distanco, kiun prudentaj homoj ne transpaŝas.

Maurice Chevalier, franca kantisto kaj aktoro, 1888-1972

Grandaj homoj kutime nek estas grandaj, nek estas homoj.

Werner Mitsch, germana aforismisto, nask. 1936

Edziĝinta viro povas fari, kion li volas, se lia edzino permesas tion.

Georg Bernard Shaw anglo-irlanda verkisto kaj Nobel-premiito, 1856-1950

La plej multaj turistoj estas kiel junaj hundoj. Ili priflaras ĉion, sed utiligas malmulton el tio.

Ernst R. Hauschka, germana aforismisto, nask. 1926



Perevalov Jurij [Lesnoj, Rusio]

Printempo, amo,
suno, bonhumoro...

La ĉarmo de printempo plej kompreneblas vintre, kiam vi sidas ĉe forno kaj verkas plej belajn printempajn kantojn.

Henrih Hajne

*

Necesas ami la vivon pli forte, ol la sencon de la vivo.

Fedor Dostojevski,

*

Amo estas nelonga tempodistanco, kiam homo de la alia sekso pensas pri ni la samon, kiel ni mem.

Magdalena Samozvanec

*

Ami ne signifas rigardi unu la alian, ami signifas rigardi en la saman direkton.

Antuan de Sent-Ekzjuperu

*

La vera amo similas al fantomo — ĉiuj pri ĝi parolas, sed tre nemultaj ĝin vidis.

Fransua Laroshfukc

*

Por esti amata, plej bonas esti bela. Sed por esti bela necesas esti amata.

Fransuaza Sagan

*

Neniam diru al virino, ke vi ne meritas ŝian amon: ŝi mem tion scias.

NN

*

La Suno estas oro de malriĉuloj

Natali Barni

*

La mondo apartenas al optimistoj - pesimistoj estas nur spektantoj.

Fransua Gizc

*

Pri vivo kj pri mono oni komencas pensi, kiam tiuj proksimiĝas al la fino.

Emil Krotkij,

*

Rido sen kialo estas signo de la bonega humoro!

Mihail Genin

ANEKDOTO

Yves Bruso [Douamenez, Francio]

Konsilo al gejunuloj

Sciu, gejunuloj, ke via estonteco estas antaŭ vi. Do, ne rigardu returnen, ke ĝi ne iĝu malantaŭe.

Konsilo al unuokuloj

Kiam vi transiras trafikplenan straton, ne palpebrumu al graciaj junulinoj, preterirantaj vin.

Ŝumilova Marina

[Suojarvi, Rusio]

Parolas du amikoj. Unu demandas la alian:

— Kion vi diras al la edzino, se vi malfrue revenas hejmen?
— Mi diras nur "Bonan vesperon", ĉion ceteran diras ŝi.

Belousov Igorj

[Marks, Rusio]

"... Daŭras savlaboroj sur la loko de falo de la duloka aeroplano, kiu antaŭ du tagoj falis sur la lokan tombejon. La sava teamo jam sukcese elfosis el la tero 657 viktimojn. Estro de la savteamo opinias, ke daŭrigo de savaj laboroj kondukos nur al la apero de novaj viktimoj de la katastrofo.

Zujeva Margarita

[Moskvo, Rusio]

— Se vi ne ĉesos drinki, oni vin forpelos de via laboro kaj vi restos sen mono.
— Por kio mi bezonos monon, se mi ĉesos drinki?

Dialogoj

kolektis kaj esperantigis
Proĥorov Sergej [Kanaŝ, Rusio]

Virino informas sian amikinson:
— Por mi maldikiĝu la kuracisto preskribis al mi ĉiutagajn ĉevalrajdojn.
— Kaj kio? Ĉu jam estas rezultoj?
— Jes! La ĉevalo jam maldikiĝis!

*

Direktoro de komerca firmao enuas. Finfine li vokas la sekretariinon:
— Alportu dosierojn pri ĉiuj homoj, kiuj laboras ĉe ni.
Kiam ŝi ilin alportas, li hazarde elektas dek dosierojn kaj ordonas:
— Tiujn maldungu!
— Kial, ĉef'?!
— Ne ŝatas mi malbonŝanculojn

Burgar Lilija

[Volgodonsk, Rusio]

La avino demandas la nepon:
— Kial viaj manoj estas malpuraj?
— Tial, ke mi per ili ĵus eklavis la vizaĝon!

*

— Mia kara filo! Kiam vi kreskiĝos, mi deziras, ke vi estu ĝentilhomo!
— Mi ne volas, paĉjo! Mi volas esti simila al vi!

Doktoro, mi havas truon en la memoro...

— Doktoro, ĉe mi ofte aperas malplenaj truoj en la memoro, tio signifas ke mi absolute nenion memoras!
— Klare. Kiam lastatempe vi spertis ĉi tion?
— Kion?
— Nu, la truojn?
— Damne, pri kiuj truoj temas?

*


— Mi aŭdis, ke en iu nova instituto oni faris al vi operacion, kiu plibonigas la memorkapablon.
— Ho, jes, estas tre bona, tre bona instituto.
— Kiel ĝi nomiĝas?
— Hm... Kiel oni nomas tiun ruĝan floron, kun dornoj?
— Ĉu rozo?
— Jes, dankon.
ROZAAAA!!! Kiel nomiĝas tiu instituto, kie oni faris al mi la operacion?



Victoriano Almenures [Havano, Kubo]

Viro kaj virino estas en butikoj. La viro petis vendiston montri verdan kravaton. La edzino:
— Stultulo, kun tia kravato vi aspektos kiel perfekta dupo!
— Bone, - la viro diris al la vendisto, - montru al mi la ruĝan.
— Kreteno, ĉu vi volas aspekti sengusta?
— Damne, tiuokaze donu al mi la flavan.
— Idioto, flavajn kravatojn uzas nur senhejmuloj!
La kolerega edzo elpoŝigis pistolon kaj pafmortigis ŝin. Kaj diris al la ŝokita vendisto:
— Amiko, donu la nigran.

Unu viro venis al psikiatro:
— Ĉu vi povos helpi mian fraton? Li kredas sin esti kato.
Psikiatro:
— Kaj de kiam li pensas tion?
— De kiam li estis katido.



Komjuĥina Anna [Barnaui, Rusio]

Karaj legantoj! Ĉi-foje por nia nova rubriko "Diversaj ondoj el huna mondo" venis kontribuoj de la legantoj el Germanio. Cezar tradukas la faman germanan fabelon "La lupoj kaj la sep kapridoj" de fratoj Grimm kaj Dorothea Kaizer proponas por via atento novan kuir-recepton.

Diversaj ondoj

Esperantigis **Cezar**
[Altenburg, Germanio]

La lupoj kaj la sep kapridoj



Estis iam maljuna kaprino, kiu havis sep idojn. Ŝi amis ilin, kiel ĉiu patrino amas siajn infanojn. Iun tagon ŝi volis iri en la arbaron por alporti nutraĵojn. La kaprino kunvokis ĉiujn sep idojn kaj parolis: "Karaj infanoj, mi volas iri en la arbaron, bone gardu vin kontraŭ la lupoj. Se li envenos, li manĝos vin ĉiujn kun haŭto kaj haroj. La fripono ofte maskas sin kiel aliulo, sed je lia raŭka voĉo kaj je liaj nigraj piedoj vi tuj ekonos lin."

La kapridoj diris: "Kara patrino, ni estos singardaj, vi povas trankvile foriri". La patrino ekblekis kaj kontente foriris. Baldaŭ iu frapis la domopordon kaj vokis: "Malfermu, karaj infanoj, via panjo alvenis kaj kunportis ion por ĉiu". Sed la kapridoj komprenis laŭ la raŭka voĉo, ke li estas la lupoj. "Ni ne malfermos", - ili respondis. - "Vi ne estas nia patrino, ŝi havas delikatan kaj ĉarman voĉon, sed via voĉo estas raŭka; vi estas la lupoj".

La lupoj iris al butikisto kaj aĉetis grandan pecon da kreto. Li manĝis ĝin kaj lia voĉo

fariĝis delikata. Tiam la lupoj revenis, frapis la pordon kaj vokis: "Malfermu, karaj infanoj, via panjo alvenis kaj kunportis ion por ĉiu." Sed ĉar la lupoj metis sian nigran piedon sur la fenestron, la infanoj rekonis lin kaj respondis: "Ni ne malfermos, nia patrino ne havas nigran piedon kiel vi, vi estas la lupoj".

Nun la lupoj kuris al bakisto kaj diris: "Mi puŝigis per la piedoj, ŝmiru ilin per pasto". Post kiam la bakisto ŝmiris la piedojn, li kuris al muelisto kaj diris: "Ŝutu blankan farunon sur miajn piedojn." La muelisto pensis, ke la lupoj volas trompi iun kaj rifuzis al li. Sed la lupoj diris: "Se vi ne faros tion, mi vin voros". La muelisto ektimis kaj blankigis la lupajn piedojn. Jes, tiaj estas la homoj. La fripono iris nun trianfojon al la pordo, frapis kaj diris: "Malfermu, infanoj, via kara panjo alvenis kaj kunportis ion por ĉiu el la arbaro". La kapridoj respondis: "Montru antaŭe piedojn, por ke ni vidu, ĉu vi estas nia kara panjo". La lupoj metis la piedojn sur la fenestron. Kiam la kapridoj ekvidis, ke la piedoj estas blankaj, ili kredis ĉion, kaj malfermis la pordon.

Sed tiu, kiu eniris, estis la lupoj. Ili ektimis kaj volis sin kaŝi. Unu kapridoj saltis sub la tablon, dua en la liton, tria en la fornon, kvara en la kuirejon, kvina en la ŝrankon, sesa sub la lavopelvon, sepa en la keston de la murhorloĝo. Sed la lupoj trovis ilin ĉiujn kaj sen longe heziti englulis ĉiujn unu post la alia; li nur ne trovis la plej junan, kiu sin kaŝis en la horloĝkesto. La lupoj kontentigis sian manĝavidon, foriris, kuŝigis sur verda herbejo sub arbo kaj ekdormis.

Baldaŭ la maljuna kaprino revenis hejmen el la arbaro. Ho ve, kion ŝi devis vidi! La pordo estis vaste malfermita. La tablo, la seĝoj kaj la benkoj estis renversitaj, la lavpelvo dispecigita, la kovrilo kaj la kusenoj eltiritaj de la lito. Ŝi serĉis la infanojn, sed nenie trovis ilin. Ŝi vokis ilin unu post la alia laŭ la nomoj, sed neniu respondis. Fine,

kiam ŝi vokis la plej junan, eksonis fajna voĉo: "Kara patrino, mi sidas en la horloĝkesto." La kaprino elprenis lin kaj la kapridoj rakontis al ŝi, ke la lupoj venis kaj manĝis ĉiujn aliajn. Vi povas imagi, kiel ŝi ploris pro siaj kompatindaj infanoj.

Fine ŝi eliris kun sia ĉagreno eksteren, kaj la plej juna ido postkuris ŝin. Kiam ŝi venis al la herbejon, kuŝis tie la lupoj sub arbo kaj ronkis tiel forte, ke eĉ la branĉoj tremis. Ŝi rigardis lin de ĉiuj flankoj kaj ekvidis, ke io moviĝas kaj baraktas en lia ŝvelinta ventro. "Dio mia", - ŝi pensis, - ĉu miaj kompatindaj infanoj, kiujn li voris por vespermanĝo, ankoraŭ vivas?

La kaprideto devis kuri hejmen kaj alporti tondilon kaj kudrilajojn. Apenaŭ la kaprino distranĉis la ventron de la monstro, jen jam kapridoj etendis la kapon eksteren, kaj dum ŝi plu tranĉis, ĉiuj ses elsaltis unu post la alia. Ili ĉiuj vivis kaj eĉ ne estis vunditaj, ĉar la avida monstro forglutis ilin la tutajn. Jen la ĝojo estis granda! Ili karesis sian patrinon kaj saltetadis kiel tajloroj, kiu geedziĝas. Sed la maljuna kaprino diris: "Iru ĉiuj serĉi grandajn ŝtonojn, per kiuj ni plenigos la ventron de la sendia besto, dum li dormas ankoraŭ". La sep kapridoj altrenis la ŝtonojn kaj ŝovis ilin en la ventron de la lupoj. La kaprino kunkudris ĝin tiel rapide, ke la lupoj nenion rimarkis kaj eĉ ne moviĝis. Kiam la lupoj finfine vekigis, li ekstaris, kaj ĉar la ŝtonoj en la ventro kaŭzis grandan soifon, li volis iri al la puto. Sed kiam li ekpaŝis, la ŝtonoj en lia ventro ruligis kaj bruas. Tial la lupoj voĉis:

Kiel klakas, kiel krakas!
Mian ventron io frapas.
Estas ne kapridaj sonoj,
sed tre multaj, grandaj ŝtonoj.

Kiam li alvenis la puton, li kliniĝis al la akvo por trinki. Sed la pezaj ŝtonoj tiris lin en la akvon kaj li dronis en la puto. Kiam la sep kapridoj tion vidis, ili kuris kaj kriis: "La lupoj mortis, la lupoj mortis!" kaj dancis pro ĝojo kun la patrino ĉirkaŭ la puto.

eĵ bunta mondo

Kuirejaj receptoj de
Dorothea Kaizer
[Althenburg, Germanio]

Rostaĵo laŭ Turingio por kvar personoj

Tipa specialaĵo el Turingio
en Germanio.

Ingrediencoj:

- 800 g da nukoviando de porko
- 30 g da porkograso
- 1/2 lit. da hela biero
- 400 g da cepoj
- 400 g da marinitaj kukumoj
- salo, pipro, majorano, karvio, mustardo

Preparo:

1. Tranĉu la nukoviandon en dikajn stekojn kaj iom frapu ilin.
2. Faru marinaĵon el biero, mustardo kaj el la spicoj.
3. Metu la stekojn en la marinaĵon kaj lasu ilin tie dum kvin horoj.
4. Absorbu la marinaĵon per mola sorbema papero.
5. Varmegigu la grason en pato kaj rostu la stekojn (plej bone sur rostkrado) ĝis ili iĝos brunaj ĉe ambaŭ flankoj, fine iom rostu la cepojn.
6. Metu la rostitajn cepojn sur la stekojn kaj garnu ilin per marinitaj kukumoj.

*Mia konsilo: Al tio gustas freŝa pano
aŭ terpoma salato.*

Terpoma salato por kvar personoj

Ingrediencoj:

- 500 g da terpomoj, kiuj ne estu tro firmaj
- 1 verda kukumo
- 4 marinitaj kukumoj
- 3 malmole kuiritaj ovoj
- 500 g da tomatoj
- 1 fasko da delikataj junaj cepoj
- 1 fasko da rafanetoj
- 1 papriko
- 1 fasko da petroselo
- 400g da majonezo aŭ 1/4 lit. da jahurto
- 2 supkuleraj da fĵingusta vinagro
- 2 tekuleroj da mustardo
- 4 supkuleraj da varmega akvo
- salo, pipro, iom da sukero, eventuale papriko

Preparo:

1. Kuiru la terpomojn kun ŝelo dum 20-25 minutoj.
2. Senŝeligu la terpomojn ankoraŭ varmajn kaj distranĉu ilin en pecetojn.
3. Distranĉu la verdan kukumon, marinitajn kukumojn, tomatojn, paprikon, rafanetojn, cepojn kaj la malmole kuiritajn ovojn.
4. Haku la petroselon.
5. Miksu ĉiujn ingrediencojn en granda ujo.
6. Aldonu la vinagron, mustardon, varmegan akvon kaj iomete da sukero.
7. Spicu per salo, pipro kaj papriko.
8. Finfine aldonu laŭguste aŭ majonezon, aŭ jahurton.
9. Miksu singarde kaj lasu stari la salaton almenaŭ dum unu horo.

Bill Thorne



RIMARO

ENTO


akcidento
argumento
cemento
dento
ekvivalento
elemento
evento
incidento
instrumento
kliento
konsento
kontinento
kurento
lamento
momento
okcidento
oriento
poento
sento
silento
studento
taĉmento
tegmento

EMO

agemo
dilemo
emblemo
emo
gemo
kremo
poemo
termo

ESO

adreso
eksceso
ekspreso
intereso
kareso
konfeso
kongreso
meso
permeso
progreso
promeso



Komjuĥina Anna [Barnaul, Rusio]

Anoncetoj Informoj Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Koresponda Servo Mondskala

BP 6, 55000 Longeville en Barrois, Francio

Ĉiu korespondemulo rajtas senpage enskribiĝi. Ĉiu deziranto rekte ricevi adreson, aldonu du Internaciajn Respondukuponojn. Por simple ricevi informojn kaj aliĝilon bv. sendi unu IRK

www.multimania.com/kosomo efikso@aol.com

Ĉiam konstante akceptas korespondproponojn Japana Esperanto-Korespond-Servo

Japana Esperanto-Instituto
JP-162-0042, Wasedamati 12-3,

Sinzyuku-ku, Tokio, Japanio

<http://www.2s.biglobe.ne.jp/~jei/hp/koresp.htm>
jei@mre.biglobe.ne.jp

Afrika Koresponda Servo

Verda Kaŭzo
Esperanto Klubo
B. P. 1007,
Lomé
Togo

<http://www.dromadaire.com/m/jote/aks>
willyko80@hotmail.com

Mi estas 48 jara viro, komencanto. Mi havas ankaŭ du katojn. Int.: legado, kolektado de libroj, muziko (klasika kaj "moderna"), ĝardenado. Mi ŝatus korespondi, retroŝte aŭ paper-poŝte, kun gesamaĝuloj, ĉefe el orienta Eŭropo, Rusio, Sud Ameriko, aŭ Azio.

Scott Charlton
4040 Bobolink Lane
Hiawatha
IA 52233

Usono


sfchar@webtv.net

32 jara viro, komencanto. Int: karateo, budaismo, aliaj religioj, filozofio, politiko, kino, bonaj libroj... Mi preferas paper-poŝton.

Karlos RIELLA
Rua General Victorino, 2195
97510-330
Uruguaiana, RS,

Brazilo

Bill Thorne [Londono, Britio]



Vojaĝu ne nur letere!

Koresponda Servo Ĉina E-Ligo

Baiwan Zhuang Lu 24 Hao
Fucheng Men Wai
Beijing
CN-100037
Chinio

Juna amiko de Esperanto volas komuniki per leteroj kaj lerni E-ton kun gejunuloj el tuta mondo.

Viktor Lofgren
Heleneborgsgatan 27
SE-117 31, Stokholm
Svedio

Mi estas 30 jara komencanto, sciencisto pri la medicino de la cerbo Int: naturo, biologio, historio, kulturo kaj lingvoj.

Dr Dallas Jason Grasby
4 Francis St
Bedford Park, 5042
Suda Aŭstralio

Aŭstralio

dgrasby@arcom.com.au

Mi estas 36 jara, komencantino. Int.: legado, muziko, kulturo, vojaĝoj.

Alla Daško
Brativ Trofimovih 22-227
Dnipropetrovsk
49068

Ukrainio

galatea@creator.dp.ua

18 jara knabo, komencanto, studento. Int: Lingvoj (Germana, Esperanta, Islanda), Björk muziko, ŝatus vojaĝi kaj ret-babli.

David Gamache
133 Laval #33
Rivière-du-Loup (qc)
G5R 1V8,

Kanado

kiko_kiko17@hotmail.com

32 jara viro, komencanto. Int: karateo, budaismo, aliaj religioj, filozofio, politiko, kino, bonaj libroj... Mi preferas paper-poŝton.

Karlos RIELLA
Rua General Victorino, 2195
97510-330
Uruguaiana, RS,

Brazilo

Fraŭlo 18 jaroj, komencanto, dez. kor. pri ĉiuj temoj tutmonde

Pavel Procenko
pk 23
Berjeozovskij,
Sverdlovskaja obl.,
623704

Rusio

Mi estas viro 38-jara, fraŭlo, plurjara esperantisto. Mi estas verkisto. Int: literaturo.

Andoni Hierro
Plaza Xaho, 1-5A.
48940-Leioa (Vizcaya)

Hispanio

tepgaitj@lg.chu.es

Mi estas 60 jara komencanto. Mi estas rabeno (kiu havas liberalajn opiniojn). Intereso: Klasika muziko, filozofa diskutado, Esperanteco, teatraĵoj, tutmonda politiko, komputilo

Simhxa ROTH

Tel-Aviv, **Izraelo**.
r9509065@barak-online.net

Bonvolu noti retroŝtan adreson de **KOMENCANTO**

komencanto@r66.ru

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj !

